
# *En Kubo, Tago por Paco, kontra? la Blokado kaj Terorismo*

*Image not found or type unknown*



**Porpaca Agotago**

Havano,  sep 4 (RHC) La tutmonda malakcepto de la malamikeco de Usono kontra? Kubo alvokas hodia? la Tagon por Paco, kontra? la Blokado kaj Terorismo, promociita de la Kuba Instituto de Amikeco kun la Popoloj (ICAP).

La iniciato validos ?is la dato de prezento ?e UN de la Projekto de Rezolucio kontra? la usona blokado de la insulo kaj projektos agojn por ?ia ekskludo el la listo de supozataj sponsoroj de terorismo.

La? la direktoroj de ICAP, la komenco de la Tago estos markita de la oma?o al Fabio Di Celmo, itala turisto, kiu estis viktimo de terorisma atako kontra? la Hotelo Copacabana, en Havano, la 4-an de septembro 1997.

Same, la alvoko inkluzivas agadojn ne nur en la ?efurbo sed tra la tuta lando, en kiuj la provincaj delegacioj de ICAP estos implikitaj, diris ?iaj organizantoj anta?tage en gazetara konferenco okazinta en ?i tiu ?efurbo.

La alvoko de la kuba pacisma grupo, ili konstatis, certe trovos e?ojn inter siaj samuloj sur la planedo, same kiel ?e progresemaj homoj, kiuj sisteme postulas la finon de la malamikeco de la nordamerika lando kontra? la antila nacio, por pli ol ses.jardekojn.

Por atingi la planitajn celojn,  ICAP atentigas inter la specialaj instigoj, la okazigon de la Internacia Tago de Paco (21-an de septembro), la universalan kondamnon de la genocida usona blokado kaj la nepravigean inkludon de Kubo en la liston de ?tataj sponsoroj de terorismo.

Fonto: PL

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/364330-en-kubo-tago-por-paco-kontrau-la-blokado-kaj-terorismo](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/364330-en-kubo-tago-por-paco-kontrau-la-blokado-kaj-terorismo)

**Radio Habana Cuba**